Jaro VII * N.° 76ª | Aprilo * 1910

LA SUNO HISPANA

Direktoro-Administranto ★ Director-Administrador

Augusto Jimenez Loira

PINTOR LÓPEZ, 3 — VALENCIA

La Redakcio korektos la manuskriptojn laŭbezone, kaj la nepresitajn ĝi ne resendos

ENHAVO: Utila libreto.—Poezio.—Kroniko.—Hispana Societo p. p. Esperanto.—Ŝakfako.—Bibliografio.—Anoncoj.

Utila libreto

La Adresaro de Hispanaj Geesperantistoj pri kiu ni rilatis ĉe antaŭlasta numero, jam estas preta kaj oni vendas po 0'60 pesetoj ĉiu ekzemplero, kun rabato da 10, 15, 20 kaj 25 %, se oni aĉetas respektive 2, 3, 4, 5 aŭ pli da ekzempleroj ĉiumende.

La vendproduktton ni dediĉados, senmanke, monhelpi tiun ĉi revuon, kiu malavare disvastigas esperanton en Hispanujo de pli ol ses jaroj.

Ni insiste petas de ĉiuj, avertojn pri eraroj kaj pri omitoj.

Ni jam komencis la aranĝon de la unua aldono.



Sinjorino Jessie Stephens de Maclean

Aguilas (Murcia).—Hispanujo.

Librito útil

La Colección de direcciones de esperantistas españoles y españolas, al que nos referimos en el anterior último número, está ya hecho y se vende á 0'60 pesetas ejemplar, con rebaja de 10, 15, 20 y 25 %, si se compran respectivamente 2, 3, 4, 5 ó más ejemplares en cada encargo.

El producto de la venta lo dedicamos íntegro al auxilio de esta revista, que desinteresadamente difunde el esperanto en España hace más de seis años.

A todos suplicamos encarecidamente, que nos adviertan los errores y omisiones.

Hemos empezado ya á preparar el primer suplemento.

Multaj novaj floroj de kreanta penso
Levas belajn kapojn el herbara denso,
Tiuj floroj venas el kulturaj semoj
De evolucio signoj kaj emblemoj.

Floroj bonfarantaj, novenaskiĝantaj,
Multkolore brilas kapoj diamantaj,
Ruĝaj, rozaj, flavaj, lumon ame spiras,
Laŭ koloro sencon de ideoj diras.

En kalikoj bolas ŝaŭmo de nektaro,
Vero de scienco, bono de homaro,
Kaj adoro dolĉa, universa amo
Estas de kalikoj belo kaj ornamo.

Floro verda portas sencon de espero,
En tutmonda lingvo ŝaŭmas ĝia vero.
Por el herbo verda esti distingita
Ĉiam ĝi leviĝas supren altirita.

Super horizonto estas ĝía celo,
En ĉielo alte ĝi fariĝas stelo,
Bela verda stelo de esperantistoj,
Lumigante novan mondon de ekzistoj.

Sonorilojn vekas ĝia brila klaro,
Ili kune kantas venkon de homaro,
Sonoj de bonfaro dolĉe etendiĝas,
Esperanto kara ĉie enhejmiĝas.

NADINA KOLOVRAT.

Kroniko

Ni bedaŭras la mortojn de sinjoroj:

† S. M. Burney, Vicprezidanto de la Melburna Klubo (Australia), unu el la pli fervoraj propagandistoj de esperanto.

† D-ro Klapp, grava ano de Zoppot'a grupo (Germanujo).

Al iliaj familioj ni sendas la esprimon de nia kondolenco.

Plezure ni scias, ke *The Australian Esperantist* estos denove monate publikigita en *The Independent* el Benalla, Viktorio, **Australio**. Jarabono 1 Sm. Ni deziras senintermankan publikigadon al nia simpatia kolego.

Tio kaj la propagando kiun nun faras la tiea gazetaro, favore al esperanto, ĝin

Crónica

Lamentamos los fallecimientos de los señores:

† S. M. Burney, Vicepresidente del Club de Melbourne (Australia), uno de los más fervorosos propagandistas del esperanto.

† El Doctor Klapp, importante socio del grupo de Zoppot (Alemania).

A sus familias enviamos la espresión de nuestro pésame.

Con gusto sabemos, que *The Australian Esperantist* será publicado de nuevo mensualmente en *The Independent* de Benalla, Victoria, **Australia**. Cuota anual, 1 Sm. Deseamos que sin interrupción se publique nuestro simpático colega.

Eso y la propaganda que ahora hace aquella prensa en favor del esperanto, lo

dissemos en tiun landon kaj helpos la laborojn kiujn faras tieaj esperantistoj.

Nia kara kolego *Belga Esperantisto*, publikigas en Februara numero bonan portreton de la nova reĝo de **Belgujo** Alberto I[a], kaj sciigojn pri la vivsignoj de la tieaj grupoj el Autverpeno, Borgerhout'o, Bruĝo, Meĥlen'o, Verviers'o kaj Boom'o.

En tiu ĉi lasta urbo, la famkonata gimnastika societo «Turnkring Boom», organizis sukcesintan feston. Je ĝia fino aperis en la mallumo, piramide formita, la apoteozo de esperanto, prezentante ĝin kunigita frate diversajn simbolojn, kiel la Ruĝan Krucon. Super la grupo altiĝis nia verda stelo kaj oni kantis ĥore flandran cirkonstancan himnon, kies rekantaĵo estis:

«Ni havas nur unu celadon, firmigi la interpopolajn ligilojn. Esperanto estas nia komuna lingvo, ĝi disvastiĝu kaj estu konata ĉie, por la feliĉo de la homaro».

S-ro A. J. Witteryck, prezidanto de la Bruĝa grupo, faras alvokon al la komplezemo de la esperantistoj, kantistoj aŭ deklamistoj, kaj petas ilin kunhelpi al la dua nacia Kongreso okazonta la 15[an] 16[an] de Majo (Pentekostaj Tagoj). Sin turnu: 4, Nieuwe Wandeling (Nouvelle Promenade).

La proksiman Junion okazos en Pilzen (**Bohemujo**), la dua Kongreso de bohemaj esperantistaj.

Fondo de novaj grupoj kaj malfermo de novaj kursoj ne ĉesas en tiu lando.

Esperanto eniris triumfe en **Bosnio-Hercegovino**. En Sarajevo fondiĝis grupo kun granda helpo de tiea presaro kaj granda entuziasmo de la 120 unuaj anoj, kiuj sin proponas disvastigi la lingvon tra la tuta lando. Estis nomitaj prezidanto kaj sekretario, S-roj Eiselt kaj Schwarz kaj oni intencas starigi esperantan ekspozicion, pro kio niaj novaj samideanoj petas iibrojn, poŝtkartojn, gazetojn kaj kian ajn aliajn esperantaĵojn.

Nia kara samaĝano *The British Esperantisto*, rilatas pri okazintaĵoj ĉe dudek-

diseminará en aquel país y auxiliará los trabajos que hacen aquellos esperantistas.

Nuestro querido colega *Belgá Esperantisto*, publica en el número de Febrero un buen retrato del nuevo rey de Bélgica Alberto I, y noticias respecto á las señales de vida de los grupos de allí, de Amberes, Borgerhout, Brujas, Meĥlen, Verviers y Boom.

En esta última ciudad, la famosa sociedad de gimnasia «Turnkring Boom» organizó una fiesta que tuvo éxito. Al final de ella apareció en la oscuridad, en forma piramidal, la apoteosis del esperanto, presentándolo unido fraternalmente á diversos símbolos, como la Cruz Roja. Sobre el grupo se elevaba nuestra verde estrella y se cantó en coro un himno circunstancial flamenco, cuyo estribillo fué:

«Tenemos un solo propósito, asegurar los lazos entre los pueblos. Esperanto es nuestra lengua común, que se propague y sea conocida en todas partes, para la felicidad de la humanidad».

El Sr. J. A. Witteryck, presidente del grupo de Brujas, acude á la complacencia de los esperantistas, cantantes y declamantes y les pide que ayuden al segundo Congreso nacional que ha de verificarse el 15 y 16 de Mayo (días de Pentecostés). Diríjanse: 4, Nieuwe Wandeling (Nouvelle Promenade).

El próximo Junio se verificará en Pilzen (**Bohemia**), el segundo congreso de esperantistas bohemios.

La fundación de grupos y la apertura de nuevos cursos, no cesa en aquel país.

El esperanto ha entrado triunfalmente en **Bosnia-Hercegovina.** En Sarajevo se ha fundado un grupo con gran ayuda de aquella prensa y gran entusiasmo de los 120 primeros socios, que se proponen difundir el idioma por todo el país. Han sido nombrados presidente y secretario los Sres. Eiselt y Schwarz y se intenta instalar una exposición esperanta, para lo cual nuestros nuevos samideanos piden libros, postales, periódicos y otras cosas esperantas.

Nuestro querido contemporáneo *The British Esperantisto*, se refiere á hechos

ok esperantaj societoj dum la lasta Marto en **Britaj Insuloj,** kio montras, ke ni tie ĉiam antaŭeniras.

Lumo, nia kara amiko, sciigas, ke la militistaro el **Bulgarujo** multe sin interesas por esperanto kaj publikigas en ĝia Januara numero interesajn fotogravuraĵojn pri la bulgara Kongreso. El ĝiaj raportoj pri la grupoj oni konkludas, ke iliaj laboroj estas senintermankaj.

Laŭ rilatadoj de nia kara *Finna Esperantisto,* nia kara lingvo iom post iom progresas en **Finlando** kaj estas multaj la tieaj gazetoj, kiuj laŭdante diskonigas ĝin.

La teruraj superakvegoj, kiuj kaŭzis tiom da malfeliĉaĵoj en nia kara **Francujo** plenigis je doloro la korojn de ĉiuj geesperantistoj. Okaze tia malbonaĵo ni permesas nin rememori al la amantoj de la homaro, ke la superakvojn kaj la detruon de kreskaĵoj kaj fruktoj, tiel oftaj nun en kelkaj landoj, oni evitas per la protekto al arboj kaj birdoj.

La plej interesa esperanta afero, kiu tie okazas nun, estas la Katolika Esperantista Kongreso en Parizo, kiu estos la unua Kongreso kie esperanto estos la nura interkompreniĝilo.

La programo dividiĝas laŭ du partoj: «Idealo Katolika» kaj «Servo al la Eklezio per esperanto». La unua entenas la temojn: Unueco en la Eklezio, Paco Internacia, kaj Kristana Sociala Agado, kaj la dua: Ilo por informo, Ilo por defendo kaj Ilo de propagando.

Ni kore gratulas nian karan kolegon *Juneco,* ĉar ĝia propagando videble efikas, ne nur en Francujo, sed ĉie, kaj esperanto, kiel ĉio, multe bezonas la junulojn.

La tria Kongreso de la Federacio de la grupoj esperantistaj de la Norda Franpujo, okazos en Amiens'o la 5an de la croksima Junio. Ni deziras, ke ĝi estu tiel fruktoplena, kiel tiuj de Armentieres'o kaj Condé'o.

Tiel granda estas la esperantista mo-

de veinte y ocho sociedades esperantistas durante el último Marzo en las **Islas Británicas,** lo que demuestra que allí vamos siempre adelante.

Lumo, nuestro querido amigo, manifiesta que los militares de **Bulgaria** se interesan mucho por el esperanto y publica en su número de Enero interesantes fotograbados del Congreso búlgaro. De sus relatos referentes á los grupos se deduce, que los trabajos de estos no se interrumpen.

Según lo que relata nuestro estimado *Finna Esperantisto,* nuestro querido idioma progresa poco á poco en **Finlandia** y son muchos los periódicos de allí, que lo dan á conocer alabándolo.

Las terribles inundaciones que han causado tantas desgracias en nuestra querida **Francia** han llenado de dolor los corazones de todos los esperantistas. Con motivo de esta desgracia nos permitimos recordar á los amantes de la humanidad, que las inundaciones y la destrucción de las plantas y frutos, tan frecuentes ahora en algunos países, se evitan protegiendo los árboles y pájaros.

El más interesante asunto que ocurre allí ahora, es el Congreso Católico Esperantista en París, que será el primer Congreso en el cual el esperanto será el único medio de entenderse.

El programa se divide en dos partes: «Ideal Católico» y «Servicio á la Iglesia por el Esperanto». La primera contiene los temas: Unión en la Iglesia, Paz Internacional y Acción Social Cristiana, y la segunda: Medios de información, Medios de defensa y Medios de propaganda.

Cariñosamente felicitamos á nuestro querido colega *Juneco,* por que su propaganda visiblemente da resultados, no solamente en Francia, sino en todas partes, y el esperanto, como todo, necesita mucho á los jóvenes.

El tercer Congreso de los grupos del Norte de Francia se verificará en Amiens el 5 del próximo Junio Deseamos que sea tan fructuoso como los de Armentieres y Condé.

Es tan grande el movimiento esperan-

vado en Parizo, ke *Paris-Esperanto* la bona revuo, organo de la Pariza grupo, okupas preskaŭ ĉiuj siaj dekdu-ok paĝoj per lokaj sciigoj.

Pri movado en **Germanujo**, ni vidas en *Germana Esperantisto*, ke en Augsburg'a kurso de Esperanto, farita de S-ro Arnold, estas dudek-kvin policanoj kaj tri kondukantoj de tramvojo; ke por Industria Ekspozicio okazonta en Schweidnitz dum 1911[a] jaro, oni aranĝos esperantan fakon kaj, ke pri tridek-sep aliaj grupoj ĝi raportas iun fakton.

Varietea Esperanta Ligo intencas aranĝi specialan lernolibreton por la Varieteanaro, kiu enhavos ankaŭ malgrandan frazaron taŭga al artista vivado.

La lasta ĵus aperinta numero de *La Duonmonata*, bela kaj lerte redaktita gazeto, estas treege interesa kaj leginda pro sia riĉa kaj diverstema enhavo; ĝi estas verkita de la eminentaj esperantistoj S-roj Ch. Ley, Kabe, Inglada, Finot, Haeseler, S-rino Mario Hankel, ktp., ktp. Ĝi estas vere rekomendinda revuo, kiu klare kaj senpartie sciigadas pri la publika vivo de la nacioj, pri la progresoj de la homa spirito kaj pri ĉiuj tutmondaj okazintaĵoj komuninteresaj. Jarabono por 22 numeroj Sm. 1'75. Leipzig, Thomasring, 6, Germanujo.

La unua Kongreso de «Universala Esperanto Asocio», okazos en Augsburg'o de la 1[a] al la 6[a] de la proksima Aŭgusto. Ĉe ĝiaj agadaj kunvenoj oni traktos pri admistrado, financaj aferoj, konsuloj, turismo, kuracistoj, junuloj, k. t. p. La helpkongresa karto kostos 1 Smn, kaj 2 Smn. plie, la kongreskarto. Sin turnu al centra oficejo de U. E. A. 10, rue de la Bourse, Geneve, Svisujo.

La Komerclernejo «Berlitz School» el Kassel'o, instruas esperanton.

Laŭ nia estimata kunpropagandisto *La Holanda Pioniro*, en Breda'o, Groningen'o, Hago, Harlem'o kaj aliaj urboj el **Holandujo** daŭrigas la esperantagemon.

En Rotterdam oni faras kurson por la kondukantoj de la urba elektra tramo.

tista en París, que *Paris-Esperanto*, la buena revista órgano del grupo de París, ocupa casi todas sus veinte y ocho páginas con noticias locales.

Respecto al movimiento en **Alemania** vemos en *Germana Esperantisto*, que en el curso de Esperanto de Augsburgo, que da el Sr. Arnold, hay veinte y cinco policías y tres conductores de tranvías; que para la Exposición Industrial que ha de tener lugar en Schweidnitz durante el año 1911, se preparará una sección de esperanto, y que con referencia á otros treinta y siete grupos apunta algún hecho.

Varietea Esperanta Ligo intenta hacer un manual especial para los artistas de Variedades, que además contendrá una fraseología útil á la vida artística.

El último, recién publicado número de *La Duonmonata*, bonita y bien redactada revista, es interesantísimo y digno de leerse por su rico y variado contenido; está escrito por los eminentes esperantistas Sres. Ch. Ley, Kabe, Inglada, Finot, Haeseler, Sra. María Hankel, etc. etc., Es verdaderamente revista que clara é imparcialmente da noticias de la vida pública de las naciones, de los progresos del humano espíritu y de todos los sucesos mundiales de común interés. Abono anual por 22 números Sm. 1'75. Leipzig, Thomasring, 6, Germanujo.

El primer Congreso de «Universala Esperanto Asocio», se verificará en Augsburgo del 1.° al 6 del próximo Agosto. En sus reuniones activas se tratará de administración, asuntos financieros, cónsules, turismo, médicos jóvenes, etc. El billete de auxiliar costará 1 Sm, y 2 Sm. más el de congresano. Diríjanse á la oficina central de U. E. A. 10, rue de la Bourse, Ginebra, Suiza.

La Escuela de Comercio «Berlitz School» de Cassel, enseña el esperanto.

Según nuestro estimado compañero de propaganda *La Holanda Pioniro*, en Breda, Groningen, Haya, Harlem y otras poblaciones de **Holanda**, continúa la afición á trabajar por el esperanto.

En Rotterdam se hace un curso á los conductores del tranvía eléctrico de la ciudad.

La unua esperantista Kongreso, kiu okazis en **Italujo**, fariĝis en Florenzo de la 21ª al la 23ª lastaj. Ni atendos sciigojn pri ĝi.

Nia kara kolego *Notizie Esperantiste* ne plu aperos, sed anstataŭos ĝin *Itala Esperantisto* ĉiumonata revuo dekdupaĝa, je lingvoj itala kaj esperanta. Jarabono 1'40 Sm. Loĝejo via S. Agostino, 6. Palermo.

Grava revuo *Ilustrazione Militare Italiana*, publikigos militajn artikolojn esperante kaj itale. Ni respekte salutas kaj tutkore gratulas, kolonelon Carpi, ĝian direktoron, kiu per tia remedo fariĝis apostolo de esperanto en sia lando.

En la urba lernejo de Gramalote'o (**Kolombio**) oni malfermis kurson pri esperanto.

La esperantistoj de Kukuta'o sin proponis por klarigi esperanton senpage al siaj samurbanoj.

Gaceta Republicana, grava ĵurnalo el Bogotá'o tre bone raportas pri Esperanto.

En Zagreb'o (**Kroatujo**) okazis vesperkunveno de esperantistoj; oni kantis, oni deklamis, kaj oni pasigis bonan, por esperanto profita, vesperon.

Esperança gazeto kiun publikigas la seminarianoj de Funchal'o (**Madejraj Insuloj**) montras la progreson de Esperanto tie, kaj ankaŭ estas posedinda pro notindaj desegnoj kiujn ĝi enhavas, faritaj mane kaj reproduktitaj per iu ajn kopiilo.

Esperantajn grupojn oni fondis en Kamara de Lobos kaj Porto de Moniz.

Laŭ *El Paladín*, en **Meksikujo** okazos la unua Nacia Esperantista Kongreso dum la dua semajno de la proksima Septembro.

Pri Teziutlan ĝi diras, ke tia estas la tiea entuziasmo por esperanto, ke en tiu vilaĝo, nur enhavanta dudekmil loĝantojn, oni klarigas kvar kursojn pri la Zamenhofa lingvo, kiu oni parolas eĉ en la stratoj, kaj ke oni projektas malfermi, esperante, kurson por komerca ofico.

Plie nia amiko *El Paladin*, la meksikaj ĵurnaloj *El Correo Español* kaj *El Im-*

El primer Congreso esperantista en **Italia** se ha verificado en Florencia del 21 al 23 último. Esperamos noticias de él.

Nuestro querido colega *Notizie Esperantiste* no se publicará más, pero lo sustituirá *Itala Esperantisto*, revista mensual de doce páginas, en italiano y esperanto. Abono anual, 1'40 Sm. Domicilio: S. Agostino, 6. Palermo.

La importante revista *Ilustrazione Militare Italiana*, publicará artículos militares en esperanto é italiano. Saludamos respetuosamente y felicitamos de todo corazón á su director, que por tal medio se ha hecho apostol del Esperanto en su país.

En la escuela municipal de Gramalote (**Colombia**), se ha empezado un curso de Esperanto.

Los esperantistas de Cucuta se han ofrecido para enseñar gratis el Esperanto á sus conciudadanos.

Gaceta Republicana, importante diario de Bogotá, hace muy buenas referencias del Esperanto.

En Zagreg (**Croacia**), ha habido una reunión de esperantistas; se cantó, se declamó y se pasó una buena velada, provechosa para el Esperanto.

El periódico *Esperança* que publican los seminaristas de Funchal (**Islas Maderas**), manifiesta el progreso del Esperanto allí, y es digna también de poseerse, por los notables dibujos que contiene, hechos á mano y reproducidos por un copiador.

Se han fundado grupos esperantistas en Camara de Lobos y Porto de Moniz.

Según *El Paladín*, en **Méjico** se verificará el primer Congreso Nacional Esperantista en la segunda semana de Septiembre próximo.

Respecto á Teziutlan dice, que es tal allí el entusiasmo por el esperanto, que en aquella población, que sólo tiene doce mil habitantes, se explican cuatro cursos de la lengua de Zamenhof, que hasta en las calles se habla, y se proyecta hacer un curso de comercio en esperanto.

Además de nuestro amigo *El Paladín*, los diarios mejicanos *El Correo Español*

parcial, favore rilatas pri Esperanto kaj ĝin propagandas. La unua kredas, ke la hispanaj esperantistoj loĝantaj en Meksikujo, devas aparteni al la hispanaj esperantistaj societoj, ne forlasante la propagandon en Meksikujo kaj la helpon al la meksikaj esperantistaj societoj.

Esperanta Gazeto, nia tiea kara kolego, fariĝis duonmonata. Ĝi daŭrigas varme la propagandon kaj sciigas la helpon de *El Regional*, *El Porvenir*, *Mi suegra* kaj *Los sucesos* el Guadalajara, *El Correo* el Ĉihuahua'o, *El Aspirante* kaj *El País* el Meksiko, kaj *El Heraldo* el Matehuala'o.

Ankaŭ ĝi enpresas, ke kun speciala permeso de Lia Moŝto Sinjoro Josefo de Jesuo Ortiz, ĉefepiskoko de Guadalajara'o, oni starigis esperantajn kursojn en la Normala Katolika Lernejo, por fraŭlinoj, kaj en la Precipa Seminario.

Ĉe kelkaj urboj el **Norvegujo** oni faras kursojn kaj en Kristiania'o ankaŭ por blinduloj. Novan grupon en Stavanger'o.

S-ro Dworski el **Polujo** proponas starigi kapitalon, por subteni niajn centrajn oficejojn kaj propagandon de Esperanto en la mondo, per fondo de moneroj kun valoro proksimume 25 Sp. kaj ilin disvendi inter la esperantistoj. Tiu ĉi kaj kiuajn permesitan rimedon provizi monon por tiaj aferoj ŝajnas al ni rekomendindaj.

La grupo el Piotrkow'o pensis eldoni propran kvaronjaran organon; sed ĝi decidis ne tion fari ĝis tiam, kiam lokaj samideanoj estas abonantoj al la nacia revuo *Pola Esperantisto*. Kiom saĝaj estas niaj Piotrkowaj samideanoj! Ĉar alie, eble estus malaperontaj la nacia kaj la regiona gazetoj.

En **Rumanujo** multe laboras la esperantistoj por nia kara afero, kaj kvankam la rezultato ne estas tiel granda, kiel la laboro, Esperanto tie progresadas.

En **Rusujo** Esperanto kreskas, kaj ni kredas ke baldaŭ pli kreskos, ĉar ĝi estis tre bone akceptita kaj multe disvastiĝas inter tieaj universitataj studentoj.

y *El Imparcial* tratan favorablemente al Esperanto y lo propagan. El primero cree que los esperantistas españoles residentes en Méjico deben pertenecer á las sociedades esperantistas españolas, sin olvidar la propaganda en Méjico y el auxilio á las sociedades mejicanas esperantistas.

Esperanta Gazeto, nuestro querido colega de allí, se ha convertido en quincenal. Continúa con calor la propaganda y notifica el auxilio de *El Regional*, *El Porvenir*, *Mi suegra* y *Los Sucesos* de Guadalajara, *El Correo* de Chihuahua, *El Aspirante* y *El País* de Méjico, y *El Heraldo* de Matehuala.

También inserta, que con expreso permiso del Ilmo. Sr. D. José de Jesús Ortíz, arzobispo de Guadalajara, se han establecido cursos de esperanto en la Escuela Normal Católica, para señoritas, y en el Seminario Mayor.

En algunas poblaciones de **Noruega** se hacen cursos y en Cristiania también para ciegos. Nuevo grupo en Stavanger.

El Sr. Dworski de **Polonia** propone crear un capital para sostener nuestros centros oficiales y la propaganda del Esperanto en el mundo, por la fundación de monedas, con valor aproximado de 25 Sp. y que se vendan entre los esperantistas. Este y cualesquier otro medio lícito de obtener dinero para tales asuntos, nos parecen recomendables.

El grupo de Piotrkow pensó en editar un órgano trimestral propio; pero decidió no hacerlo hasta cuando los samideanos de la localidad se hubieran abonado á la revista nacional *Pola Esperantisto*. ¡Qué sensatos son nuestros samideanos de Piotrkow! Por que de otra manera, quizás desaparecerían el periódico nacional y el regional.

En **Rumania** trabajan mucho los esperantistas por nuestro querido asunto, y aun cuando el resultado no es tan grande como el trabajo, el Esperanto va progresando allí.

En **Rusia** el Esperanto crece y creemos que crecerá más, porque ha sido muy bien aceptado y se propaga mucho entre los estudiantes de aquellas universidades.

Laŭ nia klera kolego *Voĉo de Kuracistoj*, Doktoro Koposov, direktoro de la Simbirsk'a malsanulejo, kaj siaj helpantoj, uzas esperanton antaŭ la malsanuloj, kiam dum vizitado oni parolas pri iliaj malsanoj kaj kuraciloj, tial, ke la malsanuloj, ne komprenante esperanton sin sentas trankvilaj, kio ajn oni diru pri ili.

Laŭ sciigoj de niaj tieaj estimataj kolegoj *Ruslanda Esperantisto* kaj *La Ondo Esperantista*, la grupoj sin movas kaj la rusa gazetaro ilin helpas.

Svisujo ne dormas. Nia frato *Svisa Espero* sciigas pri novaj kursoj, novaj grupoj, kunvenoj, paroladoj, k. t p., ĉe dekses urboj el tiu belega lando.

Kelkaj esperantistoj de Kalvarj'o (Canadá), **Usono**, fondis, laŭ nia estimata kolego *Kolombia Stelo*, esperantistan kolonion, kiu nomiĝas «Agrikultura Kunhelpanta Kolonio».

Multe oni laboras por starigi Esperanton en Sankta Kristoforo (**Venezuelujo**) kaj por publikigi nacian esperantistan ĵurnalon.

En Altagracia'o jam estas unu grupo esperantista.

Pri **Hispanujo** ankaŭ bonajn sciigojn ni havas.

La grava hispana ilustrita ĵurnalo *A B C* enpresas nun propagandajn artikolojn pri Esperanto, subskribitaj de nia agema samideano, prezidinto de Hispana Societo, sinjoro Román Ayza. La graveco de tiu fakto estas rimarkinda, ĉar *A B C* estas unu el la ĉefaj ĉiutagaj ĵurnaloj el Hispanujo kaj ĝia disvendado estas vastega.

Nia kara amiko la sinjoro Komandanto Elizaicin daŭrigas en sia interesa gazeto *Museo Exposición* la esperantan propagandan, jen per bonaj esperante artikoloj, jen per sciigoj, kiuj faras esperantemajn al ĝiaj legantoj.

S-ro A. de P. refutas en *La Voz de Alicante*, per logikaj rezonadoj, artikolon, kiun publikigis *La Correspondencia de Alicante* kontraŭ esperanto. Ni ne konas

Según nuestro ilustrado colega *La Voz de los Médicos*, el Doctor Koposov, director del hospital de Simbirsk y sus auxiliares, usan el Esperanto delante de los enfermos, cuando durante la visita se habla de las enfermedades y remedios, por que los enfermos, no entendiendo el Esperanto estén tranquilos, dígase lo que se diga de ellos.

Según noticias de nuestros estimados colegas de allí, *Ruslanda Esperantisto* y *La Ondo Esperantista*, los grupos se mueven y la prensa rusa los ayuda.

Suiza no duerme. Nuestro hermano *Svisa Espero*, da noticias de nuevos cursos, nuevos grupos, reuniones, discursos, etc., en diez y seis poblaciones de aquel hermosísimo país.

Algunos esperantistas de Calvary (Canadá), **Estados Unidos de América**, han fundado, según nuestro estimado colega *Kolombia Stelo*, una colonia esperantista que se llama «Colonia Cooperativa Agrícola».

Se trabaja mucho para establecer el Esperanto en San Cristóbal (**Venezuela**) y para publicar un periódico nacional esperantista.

En Altagracia ya hay un grupo esperantista.

Respecto á **España**, también tenemos buenas noticias.

El importante diario español ilustrado *A B C*, publica ahora artículos de propaganda del Esperanto, subscritos de nuestro laborioso samideano, presidente que fué de Hispana Societo, Sr. D. Román Ayza. La importancia de este hecho es digna de nota, pues *A B C* es uno de los principales diarios de España y su circulación es muy grande.

Nuestro querido amigo el señor Comandante Elizaicin, continúa en su interesante revista *Museo Exposición* de Alicante, la propaganda del Esperanto, ya por buenos artículos en Esperanto, ya por noticias, que hacen á sus lectores afectos al Esperanto.

El Sr. A. de P. refuta en *La Voz de Alicante*, con lógicas razones, un artículo que publicó *La Correspondencia de Alicante* contra el esperanto. Nosotros no

la atakantan skribaĵon, sed de la respondo ni deduktas, ke, kiu tiun skribis ne konas Esperanton sufiĉe por paroli pri ĝi.

Barakaldo'a urbestraro decidis subvencii tiean grupon per 120 pesetoj ĉiujare kaj oni esperas ke oni pliigos la sumon laŭ pliiĝos la grupanoj.

La klera profesoro de tiu grupo sinjoro Vincento Echarandio, sukcesas per multprofitaj instruatoj kaj helpis propagandi esperanton en la regiono per bonaj artikoloj en gazeto *El Eko de Barakaldo.*

En Barcelono okazis sukcesplene esperanta vesperfesto, organizita de la grupo «La Kvinpinta Stelo».

Post ludado de la milita marŝo «Esperanto», originale verkita de nia amiko S-ro Jose Sanchez Roglá, okazis la beleta kataluna teatraĵo titolata «Per una capa», bondirektita de S-ro F. Serrats, kiu kun f-ino R. Mestres estis tre aplaŭditaj, kiel ankaŭ S-roj Planas kaj Morell, ĉiuj anoj de la grupo.

Tuj okazis esperantista koncerto de la famkonata baritono S-ro Reig, akompanata piane de la muzikverkisto sinjoro Suñé. Oni kantis «Kanto», «Mi Rakontis» kaj «Il Pagliachi» kaj estis varmaj aplaŭdoj.

Ankaŭ estis prezentita la esperanta monologo «La Venĝemulineto» originale verkita de f-ino C. Saltiveri. La aktorineto fraŭlino M. Roqueta tiel arte ĝin ludis, ke la ĉeestantaro faris por ŝi koregan ovacion.

La bonhumora ĥoro «La Trumpeto», kantis kelkajn ŝercajn kantojn, unu el ili titolatan «Esperant Sempre» (Ĉiam esperante), kiu aludis bone nian karan lingvon, kun tekstoj katalune kaj esperante, kiujn kaŭzis grandan entuziasmon en la ĉeestintoj, kaj la sama ĥoro bonege interpretis nian himnon, orkestre akompanita kun artaj kaj humoraj ludiloj.

Kiam finiĝis la kantoj, la organizintoj de la festo surmetis en la flagon de la

conocemos el escrito acometedor, pero de la respuesta deducimos que quien lo escribió no conoce el Esperanto lo suficiente para hablar de él.

El Ayuntamiento de Baracaldo ha subvencionado á aquel grupo con 120 pesetas cada año y se espera que aumente la suma á medida que aumente el número de socios.

